

Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland - Esperanto ann an Alba
Printempo 2017 - £2.50/€3



Mezepoka preĝonukso – vidu la artikolon de Mia Casey

Enhavaj Elstaraĵoj – Preĝo Nuksoj de Mia Casey – Prezidanto:
poemo de Anneke Buys – Birdnomo en Esperanto: Jack Warren

Esperanto en Skotlando

Numero 205 - Printempo 2017 -ISSN 0014-0643

Kunredaktoro: Ed Robertson

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw View,

Kunredaktoro: Hju Rid

Edinburgh, EH4 2QP

Administranto: Mia Casey

Telefono: 07970 156549

Rete: ed.robertson@esperanto.org.uk aŭ hju_rid@yahoo.co.uk

La redakcio bonvenigas kontribuantojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando: 30a de septembro 2017**. Oni sendu kontribuantojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer aŭ LibreOffice Writer (senpage haveblaj de la koncernaj retejoj). Dokumentoj en la formato Word ankaŭ estos akceptataj. Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj.

Enhavo

El Katedro.....	3
Riproĉinde Reformista.....	4
Prezidanto.....	7
Tagmanĝo al Dio.....	8
Simona, Unua Tera Ambasadoro.....	9
La Libro de Judit.....	15
Ĉu lerni la nord-piĉenan havas "punkton"?.....	17
Preĝonuksoj.....	22
Ĉu Stilzulo aŭ Lavistino?.....	25
Birdonomoj en Esperanto.....	25
Supre: Turstrigo, supradekstre: Piga Motacilo, subadekstre: Flava motacilo.....	27
La Plej Grava Inventaĵo.....	28
Amikumu alproskimiĝas.....	35
Nekrologo.....	37
Kalendaro.....	38

La opinioj esprimitaj en Esperanto en Skotlando ne nepre kongruas kun tiuj de Esperanto en Skotlando aŭ EAS. Esperanto en Skotlando estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando: SC042398

Prezidanto: Ed Robertson

Vic-Prezidanto: Hju Rid

Sekretario: David Bisset

Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,
Motherwell, ML1 3AP

Telefono: 01698 263 199

Rete: secretary@skotlando.org

El Katedro

Antaŭ 50 jaroj, mi unue eksciis pri Esperanto de bonega instruisto en mia lernejo, Fraser Edwards, kiu interesigis min pri lingvoj ĝenerale. Mi mem ne eklernis Esperanton serioze ĝis multe pli poste, sed tio ankaŭ ne estis hieraŭ. Kvankam daŭre surprizas min mia propra kreskanta aĝo, ĉi-jare antaŭ 100 jaroj, mortis la iniciatinto de Esperanto, Eliezer Levi Zamenhof, kaj la lingvo, kiun li iniciatis, naskiĝis eĉ 30 jarojn pli frue, en liliputa kajero por ruslingvanoj. En 1917, Esperanto jam havis kelkajn denaskajn parolantojn; ĝi havis organizojn en dudeko da landoj, kaj jam okazis kelkaj Universalaj Kongresoj. Tiam jam okazis eĉ kelkaj Skotaj Kongresoj de Esperanto.

Hodiaŭ estas tute alia mondo ol antaŭ 50 aŭ 100 jaroj. Hodiaŭ jam okazis pli ol CENT Universalaj Kongresoj de Esperanto, kun ĉeestantaro kutime inter 1000 kaj 2000. Kvankam oni kelkfoje havas la impreson, ke laŭ malnovaj kriterioj aktiveco stagnas, fakte tio ne estas la kazo. Eĉ en la fruaj jaroj de Esperanto estis denaskuloj, sed hodiaŭ eĉ estas kvarageneraciaj denaskaj parolantoj de Esperanto. Ne plu estas stumblado anstataŭ esprimivo inter fluaj parolantoj. Tiam eĉ Zamenhof havis malbonan akĉenton.

Hodiaŭ ofte oni ne povas rekoni la lingvan fonon de parolanto; ne plu estas akraj bataloj pri ĉu -ata aŭ -ita estas ĝusta. Manpleno da homoj parolas Tokiponon, aŭ Klingonan, sed Esperanto ne plu havas rivalojn en ajna reala senco. Kaj plej plaĉe, almenaŭ en la interreto, Esperanto komencas atingi veran disvastiĝon, ekzemple pli ol tri-kvaronoj de miliono da lernantoj en la retejo Duolingo. Jes, Zamenhof mortis antaŭ jarcento, sed la lingvo, kiun li survoĵigis, pli vivas hodiaŭ ol iam.

Ed Robertson

Riproĉinde Reformista

La lingvo devas ŝanĝiĝi. Ĝi estas, krom tio ke nur unu persono inventis ĝin, sama kviel ĉiu alia lingvo parolata de homoj. Kaj fakte ĝi jam ŝanĝiĝis for de tia, kvia ĝi estis en la komenco. La ĉefa ŝanĝiĝo, kviu markas tiun evoluon, estas la granda larĝigo de la vortstoko. Aliaj ŝanĝiĝoj estas la vasta uzo de afiksoj kviel memstaraj vortoj, ĝenerala emo al mallongaj formoj, kaj modifo de la signifo de iuj radikoj per metoforigo aŭ per pliprecizigo.

Foje la lingvo ŝanĝiĝas pro proponoj, t.e. ne per tute senintencaj, nur instinktaj, emoj de la uzantoj. Unu grava ekzemplo de tio estas la akcepto de la *'-io'* finaĵo por landonomoj anstataŭ la *'-ujo'* de Zamenhof. Alia – por mi fakte malpli akceptinda – estas la akcepto de la sufikso *'-a'* por indiki inan personan nomon.

Ĝenerale, tamen, la lingvo ŝanĝiĝas pro la uzkutimoj de la Esperantistoj mem, do, per natura evoluo.

Parolante pri proponitaj ŝanĝoj, tamen, mi havas tri principojn. Tiuj estas:

- (a) Oni nur aldonu al la lingvo; oni ne deprenu de ĝi.
- (b) Oni ne ŝanĝu la gramatikon.
- (c) Se post iom da tempo la lingva komunumo ne alprenas proponitan ŝanĝon al si, oni forgesu pri ĝi

La riisma reformo, ekzemple, malĝustis laŭ mi pro principo (a). Oni volis forigi kaj la pronomon *'li'* kaj la pronomon *'ŝi'* por anstataŭi ambaŭn per unu pronomon, *'ri'*. Tiu ago forprenus de la lingvo esprimeblecon, nome distingo inter la seksoj simple per taŭga pronomo. Efektive, tio estis la celo de la riistoj, kviuj opiniis, erare laŭ mi, ke la ekzisto de seksodistingaj pronomoj kaŭzis seksismon en la lingvo kaj do en la mensoj de la parolantoj de Esperanto.

Pli nova propono estas la kreo de akuzativa prepozico, 'na'. Ĝi ekzistas unue por venki la malfacilon pri kviel akuzativi ne-esperantaj vortoj. Ekzemple en la frazo '*Ĉu vi konas William-on?*' la kunmetitaĵo '*William-on*' legiĝas kaj aŭdiĝas kviel krude maleleganta. Per akuzativa pronomo oni povas plielagantigi ĝin per '*Ĉu vi konas na William?*'. Ĉar tio ĉi estas aldono al la lingvo – t.e. invento de nova vorto – ĝi estas laŭ mi tute akceptinda. Mi iomete dubas pri la uzo de 'na' en ekzemple la unua frazo de tiu ĉi alineo, kviun iuj el la naistoj revortigus kviel '*Pli nova propono estas la kreo na akuzativa prepozicio "na"*'. Mi ne akceptas tian uzon unue, ĉar ĝi anstataŭigas perfekte norman strukturon, kaj due, ĉar se 'na' vere rolas kviel ekvivalento de akuzativo oni povus diri ankaŭ '*Pli nova propono estas la kreo akuzativigan prepozicion "na"*', kviu evidente ne estas akceptinda.

Mi memoras klare kviam mi estis lernanto de Esperanto, ke mi konfuziĝis pri la vorto '*kiu*'. Mi ĵus lernis ke '*kiu*' estas demanda pronomo. Se oni ne scias la identon de iu, kviu faris ion, oni demandu per '*kiu*'. '*Kiu loĝas en tiu domo?*', ekzemple, malfermas demandon kaj indikas kviaspecan informon oni serĉas. Sed en posta ĉapitro mi renkontis na '*kiu*', kviel rilatan pronomon. Tuj mi sentis malkontenton, ĉar mi kredis ke Esperanto devas esti simpla lingvo, sen esceptoj kaj sen komplika gramatiko. Tion mi sentis malgraŭ tio, ke tiel oni mistraktas la demandajn pronomojn en mia denaska lingvo, la angla. Fakte, tiu ĉi konstato helpis min rapide asimili la duoblan signifon de la demandaj vortoj en la tabelo de korelativoj.

Sed mi daŭre, eĉ ĝis nun, sentas, ke tiu duobla rolo, kviun Zamenhof ŝarĝigis al la demandaj vortoj estas makulo sur la vizaĝo de la lingvo.

Tial, do, mi proponas ne nur novan vorton, sed novan vortfamilion – pli precize, novan kolumnon en la korelativa tabelo. Apude al la ‘ki-’ vortoj kuŝu la ‘kvi-’ vortoj, kvies roloj estas deŝarĝigi de la ‘ki-’ vortoj ĉiujn signifojn, kviujn tiuj portas krom la demandajn signifojn. Vi jam vidis tra la teksto de tiu ĉi artikolo ekzemplojn de la uzo de ‘kvi-’ vortoj. Plena listo estas jena:

kviu, kvio, kvia, kvial, kviel, kvies, kvie, kviam, kviom

La kombino de konsonantoj ‘k’ kaj ‘v’ estis uzitaj de Zamenhof por reprezenti la kombino ‘qu’ de la latina kaj latinidaj lingvoj, kaj vidataj en vortoj kviel ‘kvankam’, ‘kvalifiko’, ‘kvieta’, ‘kvin’, kaj tiel plu. Do ĝi devas esti akceptebla de Esperantistoj, kviel facile prononcebla kaj jam ekzistanta en la lingvo.

Se iuj volas protesti ke mia propono enportas distingeblon en la lingvon, kviu ne estas bezonta, mi respondas per ekzemplo el ‘*La Granda Kaldrono*’ de John Francis, kvia estas sufiĉe ofte renkontata frazkontruo en nia lingvo.

‘Kiam ili enuos pri buĉado kiu alportas neniun profiton al ili, tiam la emocio eble forte reagos favore al la revoluciuloj, turnante ilian koleron for de senkulpaj germanoj kontraŭ propra kulpa registaro.’

En la citita frazo la komenco, konsistanta el dek unu vortoj, ŝajnas esti komenco de demanda frazo. Nur je la dek dua vorto oni tuj ekkomprenas ke temas pri aserto, ne demando. Se Francis havintus la eblecon li povintus komenci la frazon tiel ‘*Kviam ili enuos pri buĉado kviu alportas neniun, ktp,*’ kaj ni tuj estus sciinta ke neniel ĝi malfermas demandon.

Pro tia ĉi situacio kaj pro sento de re-ekvilibro kaj taŭgeco en nia lingvo mi prezentas al la Esperantistoj novan kolumnon en la korelativa tabelo.

Hju Rid

Prezidanto

grava valizeto
malkaŝas: 1 bananon
3 minacajn libretojn
1 poemon multobligitan
ie ankaŭ plumon

valizeto fermita denove malfermita
banano sur ĝi kaj
denove ene poemaretoj
stakigitaj bele
kopioj disdonitaj

ektuso:
ni komencu
kiu legos unue

mia rigardo forvagas
el la fenestro
en nebulon

Anneke Buys

novembro 2001
traduko februaro 2017

Anneke Buys estas bone konata poetino el Nederlando kiu estis kaj la kunlaboranto kaj la membro de la Skota Esperanto Asocio. Ŝi flue parolas Esperanton, Nederlandan, Germanan kaj la Anglan kaj

multe helpas kun tradukado kaj redaktado en tiuj lingvoj. Tra la jaroj Anneke gajnis kelkajn poeziajn premiojn. Ekde 1986 Anneke estas kasistino de BAFA (Bahaa pri-arta Asocio) kies kunfondinto ŝi estas. Ŝi ankaŭ skulptas ĉefe originalajn figurojn bestformajn kaj ornamaĵojn, ĉefe el steatito. Anneke ankaŭ involviĝas en bonfara laboro en Eŭropo.

Tagmanĝo al Dio

“*Supper to God*” de Hugh MacDairmid en la traduko el la skota de Albert Goodheir

Se vi devus doni
tagmanĝon al Dio,
via preparo
fariĝus kio?

Blankan tukon,
ilar-arĝento,
kaj vazon da floroj
en tablocentron?

Kio ajn ŝancos
en kaserolo
sendube ne mankos
Laŭ Dia volo.

Tablo purfrotita,
teleroj blublankaj,

kaj servu al si
gastoj ĉiuflankaj

Nur petas mi,
ke mi ne scios
ĉu venos vaganto
aŭ venos Dio.

Kaĉo avena,
ŝafkapa supo
estas bonvenaj
al iu vagulo.

Albert faris ĉi tiun tradukon je la komenco de sia esperanta kariero.

Simona, Unua Tera Ambasadoro

‘Bonan matenton karaj aŭskultantoj. Belas la mateno ĉi tie en Glasgovo la naŭan tridek ptm, je la 18a de januaro. La temperaturo ekstera estas nekredebla minus kvino, sed la ĉielo bluas kaj Skotlando belas kviel ĉiam. Mi estas Stefo Godvin. Hodiaŭ mi ĝojas gastigi en la studio ĵus revenintan el Brazilo – kaj mi devas diri ke varmegas kviel rostpano ĉi tie precipe por ŝi – la unuan Teran Ambasadoron de UN, Simona Anderson. Bonan matenon, Simona.’

‘Bonan matenon, Stefo. Ĝojas esti ĉi tie.’

‘Nu, ni estas ekscititaj ke vi venis. Kiel vi travivas la jetaviadilan postsekvon kaj la skotan veteron?’

‘Ho, la jetpostsekvo apenaŭ problemas – la horloĝa diferenco estas nur du horoj. Sed mi forestis apenaŭ unu jaron kaj jam forgesis kviel grize povas esti Skotlando. Hodiaŭ belegas, tamen.’

‘Ĝi ja. Ni parolos post momento pri tio, kvio sendis vin al Brazilo, sed unue, Simona – vi renkontis la Eksterteranojn!’

‘Mi ja renkontis.’

‘Kiel ili estas? Ni ĉiuj vidis ilin per enmergiĝa 3D televido, sed renkonti ilin vid-al-vide devas esti mirige.’

‘Absolute. Nur esti en ties kunesto estas nekredeble.’

‘Mi povas imagi. Kio, do, estas la diferenco vid-al-vida?’

‘Mi supozas ke laodoro.’

‘Hu. Ĉu vere?’

‘Neniel malplaĉa! Ĝi estas kviel freŝa bestaodoro, iomete kviel ĉevalo, sed sen laodoro de pajlo kaj sterko. Certe ne homa.’

‘Interese. Ili aspektas pli altaj ol ni.’

‘Jes, ili estas iomete. Iliaj kapoj havas ĉirkaŭ la saman grandon kviel la niaj, sed iliaj brakoj kaj kruroj estas iomete pli longaj. Tio kvio frapas onin estas ilia trankvilo kaj, kompreneble, la silento.’

‘Jes, ili estas tute surdmutaj, ĉu ne? Neniaj sonoj? Absolute nenio?’

‘Nenio, eĉ ne pepo. Parenteze, ni ne uzu vortojn de nia kulturo por paroli pri personoj el planedo kvie nenia vivoformo evoluigis aŭdkapablon. Sur ĝi ili estas normaj.’

‘Ups. Pardonon. Riproĉita mi!’

‘Ho ne, neniel riproĉo. Temas nur pri kompreno de ilia fono. Ni diras surda nur ĉar la plejmulto sur la Tero povas aŭdi kaj paroli. Sur ties planedo ĉe neniu besto iam ajn evoluis voĉaj kordoj. Neniu

besto eĉ blekas. Kviam ili unue renkontis homojn, ili miregis ke ni povas komuniki sen gestoj. Ili supozis ke ni uzis iaspecan telepation.’

‘Ĉu vere? Okej, multon por pridiskuto. Do kial neniŭ voĉo?’

‘Ili ne posedas pulmojn. Ili ne spiras.’

‘Ne spiras?’

‘Ili ja spiras – pro manko de pli bona vorto – sed tra la haŭto. Pro tio ili aspektas helruĝaj. La atmosfero ĉe ilia planedo enhavas pli da oksigeno ol la nia, do ili ne bezonas pulmojn. Tial, kviam ajn ili forlasas la spacoŝipon por iri sur la Tero, ili devas uzi skafandrojn. Nia atmosfero sufokus ilin.’

‘Kaj vi estis en la ŝipo?’

‘Mi ja. Estas varme kaj humide ene, kvie ili iras sen skafandroj. Senvestaj eksterteranoj estas malkvietiga vidaĵo en la komenco. Ja maltrankviliga. Sed kviam oni sidas kun ili ĉetable, oni apenaŭ povas ne ridi.’

‘Kial tiel?’

‘Pro mia glasgovknabina amuzemo. Ili havas du okulojn kviel ni, sed neniujn orelojn nek nazon.’

‘Okej. Tio estas malkvietiga.’

‘Ili havas buŝon, kviu kondukas rekte al la stomako. Nenia sono venas el ĝi – krom rukto!’

‘Ho ne!’

‘Kaj ili ruktas konstante. Ili ne povis aŭdi la bruon, do nenia etiketo ekiĝis pri ĝi. Kviam ili manĝas ĉiam okazas rukt’, rukt’, rukto, rrrrrrukt’, rukt’! Kaj jen mi sidas tie kun la Teraj reprezentantoj, provante sufoki la ridoronkojn, larmoj fluantaj sur miaj vangoj, kaj la ŝultroj skuiĝantaj. Estas koŝmare.’

‘Ho ne! Kio pri la alia finaĵo?’

‘Jes, tio ankaŭ!’

‘Simona! Ho, mia Dio, tio estas terure.’

‘Mi scias. Sed oni al kutimiĝas – finfine!’

‘Mi supozas ke oni devus. Do, Simona, vi menciis la Terajn altrangulojn. Vi estas unu el tiuj.’

‘Mi estas.’

‘Diru nin, kiel knabino el Easterhouse* trovas sin kviel Tera reprezentanto kaj poste la Unua Tera Ambasadoro por la UN en Brazilo?’

‘La rakonto de ĉifonoj ĝis riĉoj, ĉu ne? Nu, mi diplomiĝis pri Politiko kaj Internaciaj Studoj el la Universitato de Strathclyde. Post tio mi studis eksterlande por Magistriĝi kaj ankaŭ por Doktoriĝi.’

‘Do, vi estas Doktoro Simona!’

‘Pruvas nenion, Stefo, krom obstinego pri la celo!’

‘Ĉu?’

‘Ja, kompreneble. Nu, kviam mi revenis hejmen mi faris staĝon kun la registaro, kaj finfine trovis postenon en la Diplomata Misio. Mi servis nur du jarojn kviam la Eksterteranoj alvenis. Do kvankam mi havis ĉiujn taŭgajn kvalifikojn mi ankoraŭ ne akiris sufiĉan sperton por altranga posteno.’

‘Sed la Eksterteranoj povis komuniki nur per gestolingvo.’

‘Ĝuste, kaj ses semajnojn poste mi direktiĝis al ties alteriĝa punkto en brazila pluvarbaro. Vi scias ke la Eksterteranoj tute inversigis la sorton de la surdula komunumo tra la tuta terglobo.’

‘Ili estis kviel duarangaj civitanoj.’

‘Fakte, eĉ malpli. Tre malmultaj landoj estas tiel enlumiĝintaj kviel

estis Skotlando dum la frua 21a jarcento, kaj en tro multaj landoj surduloj ankoraŭ vivas ĉe la marĝenoj. Nun subite ili fariĝis la plej serĉataj individuoj sur la tuta planedo.’

‘Nu, Simona, vi mem ne estas surdulo. Vi estas en, kiel ĝi nomiĝas? Iasa.’

‘AISA.’

‘Ha, jes, AISA. Ĉu vi klarigu al miaj aŭskultantoj kvion tio signifas?’

‘Ĝi signifas Aŭdkapablaj Idoj de Surdaj Adoltoj.’

‘Ha, ĝuste, Mi memoras.’

‘Ambaŭ miaj gepatroj estis surdaj, sed miaj fratoj kaj mi estis aŭdkapablaj. Ni kreskis en surdula hejmo; lernis gestolingvon. Tamen ekster la domo ni parolis angle.’

‘Kaj pro tio anoj de AISA?’

‘Jes, sed AISA apenaŭ estas bezonata en 2056 en Skotlando. Tamen en la pasinteco, infanoj de surdaj gepatroj devis paroli por ili. Imagu tion ke vi devas interpreti por via patro aŭ patrino ĉe la kuracisto, aŭ se ili disputas kun najbaro. Multaj homoj kviel ni plenkreskis havantaj emociajn problemojn, kaj por ili AISA estis vivosavilo.’

‘Mi povas imagi. Kompreneble, ĉiuj scipovas gestolingvon nuntempe.’

‘Precize. Ekde tiam, kviam la malnova SQA* inkluzivis Britan Gestan Lingvon kviel kvalifikon des pli da homoj lernis ĝin, ĝis antaŭ kvardek jaroj ĝi fariĝis parto de la kerna instruprogramo por bazaj lernejoj. Fakte ni ankoraŭ estas la nura lando tra la tuta mondo en kviu ĉiuj scipovas gestolingvon.’

‘Kaj tio estis unu el la kialoj por via elektiĝo kviel Unua Tera Ambasadoro.’

‘Jes, ĝi estis. La unuaj surduloj, kviujn la Eksterteranoj renkontis, klarigis la diferencon inter aŭdkapablaj homoj kaj si mem; pri kviel ili estas minoritato; pri kviel interpretistoj eĉ pli raras.’

‘Tio devis ŝoki ilin.’

‘Ili preskaŭ ne kredis.’

‘Sed vi estis nur unu el multaj. Kial, do, via altrangiĝo?’

‘Ĝuste. Kviam mi alvenis jam ĉeestis du mil gestuzantoj, sed la Eksterteranoj pasigis tempon asidue kun ĉiu el ni. Dum mia lasta babilo kun ili – fakte mi intencis hejmenreveni la sekvan tagon – mi hazarde menciis ke ĉiuj en Skotlando povas gestparoli. Kaj pro tio, ĉio ekokazis. La Eksterteranoj diskutis kun la UN, kaj ses monatojn poste oni katapultis min en la postenon de Unua Tera Ambasadoro.’

‘Do kial tio gravis por ili?’

‘Plaĉis al ili la ebleco gestparoli kun ĉiuj homoj ĉirkaŭ si. La cetera mondo postsekvos, sed Skotlando jam kapablas.’

‘Sed tio gravus nur se la Eksterteranoj loĝus en Skotlando.’

‘Ĝuste, Stefo, kaj la aŭtoritatoj rajtigis min anonci dum via programo ke la Eksterteranoj starigos sian permanentan bazon ĉi tie en Skotlando.’

‘Kio?’

‘Jes.’

‘Vi nepre ŝercmokus min, Simona, la Eksterteranoj ĉi tie?’

‘Neniu ŝerco.’

‘Sankta Dio. Kie? En Edinburgo, mi tutkore esperas.’

‘Ne. Ĉi tie en Glasgovo – estas tiom pli amike, kompreneble.’

Hju Rid

*Easterhouse – malriĉa kvartalo en orienta Glasgovo.

**SQA – Scottish Qualifications Authority – Skota Kvalifika Aŭtoritato

La Libro de Judit

Estas mia kutimo legi por mallonga tempo enlite antaŭ endormiĝi, kaj mi trovas, ke se la subjekto estas banala aŭ enuiga, des pli bone. La librojn de la Malnova Testamento mi povas rekomendi, ĉar la konstantaj morto kaj detruo de nacioj iĝas lacigaj post mallonga tempo. Antaŭnelonge, leginte iujn de la apokrifaj verkoj, kiuj estis eldonitaj en la 'Reĝo Jakobo' Biblio de 1611, sed forigitaj en 1885, mi trovis sufiĉe interesan kaj amuzan rakonton en la libro de Judit. Tiu rakonto estas, kiel ĉiuj apokrifaj verkoj, de nekonata origino, proprieto kaj de dubinda aŭtenteco. Ili estas inkluzitivaj en la Katolika kaj Ortodoksa Malnovaj Testamentoj, sed ekskluditaj de Judaj kaj Protestantaj tekstoj.

La rakonto okazas dum la tempo kiam la Granda Reĝo Nebukadnecaro, kiu regis la Asirian Imperion sendis siajn armeojn sub la komando de sia Generalo, Holofernes, por subigi la Izraelidojn en Jerusalemo, kiuj ribelis kontraŭ li. La Izraelidoj, kiam ili vidis la grandan armeon de la Asirianoj, kiuj venis kontraŭ ili, sin armigis por defendo de siaj turoj kaj muroj, sed la Asirianoj sieĝis ilin kaj ekposedis iliajn putojn. Kiam la Izraelidoj soifiĝis, multaj kolapsis en la varmeco. Post kelka tempo la sufero iĝis tro malbona kaj ili decidis kapitulacii al la malamikoj. Judit, filino de Merkri, filo de Bovo, filo de Josef ktp, kaj vidvino de Mnasee, kiu mortis dum la

rikolto, aŭdis pri la decido kapitulacii kaj alvokis la ĉefojn al si kaj diris, ke ŝi havas planon por savi la homojn. La ĉefoj konsentis ke ŝi povas forlasi Jerusalemon kaj iri al la tendaro de la Asirianoj. Judit ne diris al ili kion ŝi intencis.

Judit estis vidvino de post tri jaroj kaj kvar monatoj. Ŝi estis virino de granda beleco kaj saĝeco kaj konata pro sia boneco. Ŝia edzo postlasis al ŝi multajn oron, arĝenton, teron kaj aliajn posedojn. Post lia morto ŝi kovris sian lumbon per sakŝtofo kaj vidvinecaj vestoj. Tiam Judit forigis siajn sakŝtofon, lavis sin per akvo kaj ŝmiris sin per multekostaj parfumoj. Ŝi vestis sin per siaj plej bonaj vestoj, surmetis siajn juvelitajn sandalojn, surmetis siajn orajn kaj arĝentajn juvelojn kaj vestis sian hararon per agrafoj de oro. Ŝi kaj ŝia sklavino iris al la pordego kaj estis permesitaj de la ĉefoj de la popolo forlasi je ilia misio savi la nacion el pereco.

Kiam ili atingis la tendaron de la Asirianoj, Judit diris al la gvardianoj ke ili estis forkurantoj el Jerusalemo kaj ke ili deziras protekton de la Judoj. La gvardianoj miris pro ŝia gracieco kaj beleco, kaj volonte proponis protekti ŝin. Judit petis ke oni konduku ilin al la Generalo, Holofernes, ĉar ŝi havis informon por doni al li. Ili gvidis ŝin al la pavilono kie li kuŝis kaj kiam Holofernes vidis ŝin en la tuto de ŝia beleco, li estis ravita kaj bonvenigis ŝin al lia tendo.

Judit kaj ŝia sklavino restis en la tendaro de Holofernes dum tri tagoj kaj estis traktitaj kun granda respekto. Okazis festado kaj drinkado kaj dum la tria nokto, Holofernes trinkinte tro multe, endormiĝis sur la lito. Estro de liaj korteganoj, Bogoas, vidante sian mastron dormantan, malbaris la ĉambron, lasante Judit kaj Holofernes solaj.

Judit finfine vidis sian ŝancon kaj prenis desupre la glavon de Holofernes, kaj preĝinte al Dio por forto, dehakis la kapon de Holofernes per du batoj. Ŝi volvis la kapon en vesto, transdonis ĝin

al sia sklavino, forlasis la tendaron de la Asirianoj kaj revenis al Jerusalemo.

Matene, Dogoas, la eŭnuko, iris al la tendo de sia mastro por vekigi lin kaj trovis la senkapan korpon sur la lito. Kiam tio estis diskonigita, granda timo venis sur la Asirianoj, ili perdis kuraĝon kaj ili fuĝis en ĉiujn direktojn.

Je sia reveno al Jerusalemo, Judit estis salutita kun granda ĝojo kaj ŝi ordonis, ke on metu la kapon de Holofernes en elstara pozicio por ke ĉiuj vidu. La batalantaj Izraelidoj surmetis siajn kirasojn, starigis armiloj, persekutis la Asirianojn el la lando kaj multaj estis buĉitaj. Tiam la Judoj dankis Dion kaj laŭdis lin pro lia kompatado al ili. Oni traktis Judit per granda honoro pro ŝia heroeco. Ŝi restis fraŭla por la resto de sia vivo, sed estis amata de ĉiuj.

Tio estas multe mallongigita versio de la rakonto kaj enhavas la bazajn elementojn de la intrigo. La demando povas esti starigita, ĉu la ago de Judit estu konsiderata heroa kaj estiminda, aŭ perfida kaj malfidinda. Mi supozas ke ĉio dependas de tio ĉu vi estas Izraelido aŭ Asiriano, sed donas panon por penso kaj ankaŭ sugestas, ke la Malnova Testamento estas ne tiel enuiga kiel mi unue proponis. Oni povus sugesti, ke homoj tute impreseblaj de bela virinoj, farus bone surhavante kolan protekton.

Donald Robertson

Ĉu lerni la nord-piĉenan havas “punkton”?


En septembro, kiam mi iris al Italio por ĉeesti la geedziĝon de Francesco Maurelli kaj Sara Spanò, mi alvenis la ĵaŭdon por havi liberan tagon en la vendredo. La geedziĝo estis en la agrabla

apudlaga vilaĝo Castel Gandolfo, sude de Romo, kaj tradicia somerloĝejo de la papoj, tamen aktuale ŝajne la loĝejo nur de la emeritiĝinta papo. Tamen malgraŭ la beleco de la loko, mi volis kapti la okazon de libera tago en la vendredo por reiri al Romo, trajnvojaĝo de proksimume unu horo, kaj viziti muzeon tie.

Fakte, mi multe vizitas Romon, kaj mia ĉefa historia intereso kiu rilatas al Italio estas la lingvo kaj kulturo de la Etruskoj. Estas du gravaj muzeoj en Romo kiu koncernas sin pri la Etruskoj. Mi rekomendas ilin kaj mi mem jam vizitis ambaŭ plurfoje. Unu estas la **Nacia Etruska Muzeo** en Villa Giulia en bela kvietaj parklando, malfermita ĉiun tagon krom lundo, enirprezo kostas 8 eŭrojn, senpage en la unua dimanĉo de la monato. Ĝi havas belan kolekton da etruskaĵoj, kaj vi povas kviete rigardi ilin sen la premado de homamasoj ĉe aliaj turismaj allogaĵoj en Romo. La alia estas la **Gregoriana Muzeo en la Vatikano**, malfermita ĉiun tagon krom dimanĉo. Enirprezo al la Vatikano kiel tuto kostas 20 eŭrojn. Biletoj estas plej bone aĉetitaj anticipe en la interreto. La Vatikano estas malfermita senpage en la mateno de la lasta dimanĉo de la monato. Kiel diras la germanoj, ĉi tiuj informoj estas sen garantio. La Gregoriana Muzeo havas iomete malpli da etruskaĵoj ol Villa Giulia, tamen ĝi ankaŭ havas interesajn aferojn el aliaj periodoj kaj aliaj kulturoj, sed antaŭ ĉio ĝi estas vere rekomendinde kvietaj oazo en la Vatikano, kiu estas aliloke treege plena je turistoj.

Tamen, ĉi-foje mi ne iris tien. Mi serĉis alian antikvaĵon, ŝtonon kiun mi antaŭe ne vidis en la realo. Fotojn jes, sed por studi epigrafion, oni nepre vidu la originalon. En unu libro mi eĉ vidis desegnaĵon de epigrafiaĵo kiu estis falsigita de la aŭtoro, kiu ŝanĝis literojn por pravigi sian propran analizon de surskribaĵo. Ĉi tiun ŝtonon mi volis vidi, kaj ĝi troviĝas en la muzeo Pigorini en Romo, plena titolo **Museo Nazionale Preistorico Etnografico „Luigi Pigorini”**, malfermita ĉiun tagon krom lundo, kaj enirprezo 6 eŭroj.

Ĉi tiu ŝtono **ne** estas en la etruska. La etruska kavas pli ol **dek mil** epigrafiaĵojn, kaj ankoraŭ nun ade elfosiĝas novaj surskribaĵoj. Jen sube bildoj de la fronto kaj malfronto de la ŝtono.



Aldone, dum la lastaj dudek jaroj kreskis la kvanto de publikigitaj etruskaj tekstoj eĉ dekprocente. Ni pli kaj pli komprenas la gramatikon kaj vortprovizon de la etruska lingvo. Tamen, ĉi tiu teksto kiun mi serĉis, kaj videblaj en la bildoj estas ne en la etruska, sed en la nord-piĉena lingvo. Kaj ĝi estas la **sola** plena teksto, kun siaj proksimume sesdek vortoj, en ĉi tiu lingvo, krom tri rompitaĵ

fragmentoj kiuj konsistas el unusola vorto aŭ parto de vorto. Ni eĉ ne certas ĉu la fragmentoj fakte estas en la sama lingvo.

Do, kio estas la nord-piĉena lingvo? Kaj kio pri la sud-piĉena? Kaj kio estas skribita sur la ŝtono?

Unue pri la sud-piĉena. Mi revenos al nord-piĉena pli poste. La sud-piĉena lingvo havas 23 epigrafiaĵojn, kaj la plejmulto el ili venas de la itala regiono Abruzzo, ĉe la orienta marbordo, ĉe la mala flanko ol Romo en la okcidento. Tamen, ne estas tre malfacile kompreni ilin. La sud-piĉena estas parenca al la plej bone konataj lingvoj oska kaj umbria, kiuj siavice estas sufiĉe parencaj al la latina lingvo, kaj do kompreni la sud-piĉenan vere ne estas problemo ... por specialistoj.

La unusola nord-piĉena epigrafiaĵo kaj la tri fragmentoj venas de, kompreneble, iomete pli norda regiono ol la sud-piĉenaj tekstoj, do pli proksimaj al la urbo Ancona. La epigrafiaĵo mem venas de iomete pli norde de ĝi, proksime al la bela adriatika marbordo, la urbo Rimini, kaj la landeto San Marino, regiono (kaj landeto) kiujn mi parenteze rekomendas por vizito. Tamen Italio estas sufiĉe centralisma lando, kaj la ŝtono nun do konserviĝas en la Muzeo Pigorini en Romo.

La problemo pri nia nord-piĉena epigrafiaĵo, la ŝtono, kiun mi volis viziti, estas, ke oni ne povas kompreni ĝin. Eĉ spertuloj pri aliaj antikvaj italaj lingvoj ne havas ideon. Luj sugestis, ke ĝi eĉ ne estas hindeŭropa lingvo. Certe ĝi ne estas proksime parenca al konata lingvo. Mi mem ne sciis kiel antaŭeniri. Normale oni klopodus antaŭeniri per kompreni la kontekston de la epigrafiaĵo. Ĝi estas iomete longa por epitafo, kaj ne estas evidentaj nomoj, kaj sur la dorso estas sceno de ĉasado. En la etruska, ekzistas dokumentoj de simila longeco, kiuj estas leĝaj deklaroj pri limoj de bienoj. Kaj antaŭ ĉio, ne ekzistas mallongaj, facile kompreneblaj tekstoj kiuj

estas kompreneblaj, kaj kies funkcioj estas evidentaj.

Do, ĉu mia vizito por inspekti la ŝtonon en la realo estis fruktodona? Fakte jes. Se vi rigardas la tekston, la alfabeto tre similas al la etruska alfabeto, kaj legiĝas de dekstro maldekstren, kaj la unuaj vortoj ŝajnas esti „**MIMNIS ERUT CAARESTADES**”, kun la vortoj disdividitaj de punktoj. Tamen, mi reiras al mia admono ĉe la komenco. ***Ne fidu je bildoj; inspektu la monumenton propraokule.*** Kaj mi malkovris, ke en kio ŝajne estas la tria vorto, fakte vere estas punkto ĉizita inter **CA** kaj **ARESTADES**, kaj ke ili do estas du disaj vortoj, kaj ne nur unu, kiel ŝajnas esti la kazo en la kutimaj bildoj kaj desegnaĵoj de la ŝtono. Kaj tiu **CA** povus esti tipa demonstra aŭ rilata pronomo en hind-eŭropa lingvo. Do, tiel mi povis esti memkontenta, ke mia vojaĝo al Romo estis iasence sukcesa, kaj mi nun estis preta por festi.

Ed Robertson

Preĝonuksoj

Homoj en la pasinteco ŝatis esprimi sian amon de religio ne nur per belaj preĝlibroj kaj rozarioj sed ankaŭ per uzo de preĝonuksoj. Preĝonuksoj estas hodiaŭ aprezataj kiel nekredebla artaĵo de la 16a jarcento.



Ili efektive ne estas veraj nuksoj sed malgrandaj preĝobjektoj faritaj el buksa ligno far metiistoj-artistoj en la Norda Eŭropo sed

precipe en Nederlando en la frua 16a jarcento. Ili estis faritaj el unu sola ligna peceto en nuksa formo kun dimensioj de 5.5 cm de longeco, 4.6 cm de alteco kaj, kiam malfermitaj, ili estis 10.5 cm longaj. La nuksoj estis sufiĉe malgrandaj por alkroĉi al la zono, rozario aŭ portitaj en la poŝo. La preĝonuksoj estis ofte parfumitaj per gamo da parfumo por krei eĉ pli grandan sensan sperton por iliaj posedantoj.



Rigardante la nuksojn oni vidas ke ilia prilaboro bezonis grandegan paciencon, stabilan manon kaj longtempan laboron. Tio

kompreneble rezultigis en tre alta kosto de preĝonuksoj. Nur riĉaj kaj potencaj homoj povis aĉeti ilin. Pro tio, la posedo de nuksoj montris statuson de riĉeco.



La ekstero de la nuksoj estas mirinde skulptita kun komplikaj dezegnoj. Lignaj ĉarniroj ebligas malfermon de la nukso kaj montras internajn panelojn ĉizitaj kun diversaj religiaj scenoj. Ili povas esti nekredeble detalaj scenoj dediĉitaj al la certa sanktulo, religia evento kiel Krucumo aŭ tipo de preĝo.

Kvankam simplajn lignajn preĝonuksojn oni trovas nuntempe en multaj kulturoj, oni neniam poste produktis artaĵojn similaj al tiuj de la 16a jarcento.

Mia Casey

Ĉu Stilzulo aŭ Lavistino?

Birdonomoj en Esperanto

Adeptoj de Esperanto forte varbas por la internacia lingvo; tiom, ke ili emas eviti mencion de ĝiaj apartaj malavantaĝoj. Inter tiuj estas la manko de surstrata uzado. Tipa nacilingvo disvastiĝas unue kiel parolata lingvo kaj nur poste atingas la presitan paĝon. Eĉ la plej elegantaj formoj de la skribita lingvaĵo nutras sin per la lingvostilo parolata surstrate, ĉelabore aŭ en kafejoj. Esperanto aliflanke kreiĝis surpaĝe; pro tio la nomoj de birdoj, bestoj kaj plantoj ĉerpiĝis el la sciencaj nomoj en la latina lingvo; nomoj plejparte nekonataj al lernantoj kaj malfacile memoreblaj.

Kiel parolantoj de nacilingvo kutimis nomi la vivantajn estaĵojn en sia medio? Verŝajne la unuaj provoj estas kun kromnomoj pri apartaj ecoj de certa birdo, besto aŭ planto. Lernanto emas supozi, ke en fremda lingvo oni uzos la saman econ, kiel en la gepatra. Sed tiuj kromnomoj estas tre diversaj kaj malfacile diveneblaj. Ĉiu lingva komunumo elektas proprajn kromnomojn. Elefanto ekzemple povus esti 'longrostrulo,' 'sulkulo,' 'grizulo' aŭ eĉ - se estas kulto, ĉe kiu la besto estas adorata - 'la granda sanktulo.' Krome, parolata lingvo sen skribita formo havas dialektojn, kiuj siavice uzas diversajn nomojn por la sama afero.

Esplorante tiun diversecon mi elektis la nomojn de du birdotipoj en kvin eŭropaj lingvoj. La turstrigo, *tyto alba*, nomiĝas en la angla 'greneja strigo,' supozeble pro ĝia emo nestiĝi en malnovaj konstruaĵoj. Sed la germana kaj la franca nomoj diversmaniere aludas ĝian impone blankan vizaĝon. En la germana la birdo estas 'vualita strigo;' en la franca ĝi povas esti aŭ 'timiga strigo' aŭ 'blanka

damo.' En la hispana ĝi ŝajne ne meritas tiom da atento, estante aŭ simple 'strigo' aŭ 'vulgara strigo.' La sveda nomo esperantigita estas ankaŭ 'turstrigo.' Eble iu svedlingva akademiano kontribuis tiun eron al la vortprovizo de Esperanto.

Ne malpli diversaj en tiuj lingvoj estas la nomoj de la motacilo, *motacilla alba*. La unua parto de la latina nomo estas el la verbo *motare* - movigi, skui aŭ kirli. Jen iom da similo kun la angla nomo 'svingvostulo.' Unu el la svedaj nomoj por motacilo, esperantigita, donas la samsignifan vorton.

Sed ĉu temas pri la *motacilla alba* - laŭvorte la 'blanka' - aŭ *motacilla flava*? Jen eĉ pli granda diverseco inter la nomoj. La blanka - aŭ blankagriza - estas en la angla 'piga vostulo.' Germanparolantoj nomas ĝin 'rivereta stilzulo,' emfazante kaj la longajn piedojn kaj la emon de tiu birdo vizitadi akvon. En la franca ĝi estas nur 'griza motacilo,' sed en la hispana 'blanka lavistino' - supozeble alia aludo al akvo, aŭ al la homoj, kiuj plej ofte vidis ĝin tie.

Kio pri la flava motacilo? Ĝuste tiel ĝi nomiĝas en la angla kaj la sveda, sed en la germana ĝi estas 'ŝafstilzulo,' eble ĉar ĝi preferas vizitadi kampojn. En la franca ĝi estas la 'printempa,' en la hispana la 'brutpelista' motacilo. Ĉu estis ĉe tiu tasko, ke oni plej ofte rimarkis tiun birdon, kiel faris la lavistinoj ĉe sia laboro?

Fascina kaj bunta, do, estas la nacilingvaj nomoj de birdoj, bestoj kaj plantoj, kompare kun tiuj nomoj en Esperanto. Ĉu tiu estas manko? Nu, la dunoma sistemo de la botanikisto Lineo estis granda antaŭpaŝo por la scienco, kaj ankaŭ Esperanto profitis de ĝia internacieco. Per tiu sistemo la nomoj de diversaj specioj estas rekoneblaj al esperantistoj tra la tuta mondo. Tamen tiuj nomoj estas malfacile lerneblaj por laiko. Mi bezonis sufiĉe longan tempon por fari mensan bildon de kia birdo estas motacilo. Kromnomoj kiel

'svingvostulo' estus ne nur pli facile lerneblaj; ili spegulas la senton, foje eĉ karecon, de la homaro por la naturo. Sed se oni ne uzas latindevenajn nomojn, kiel decidi elekti inter svingvostulojn, stilzulojn kaj lavistinojn? Almenaŭ la latina estas neŭtrala kaj ĉie komprenebla. Jen problemo nesolvebla; do plej bone estas ne aludi ĝin se vi varbas por la internacia lingvo.

Jack Warren



Supre: Turstrigo,
supradekstre: Piga Motacilo,
dekstre: Flava motacilo.

La Plej Grava Inventaĵo

Dum la marta kunveno de la Glasgova Esperanto-Societo ĉiu membro kontribuis al la vespero per mallonga parolo pri la temo 'La Plej Grava Inventaĵo'. Jen sube iuj el la prezentetoj.

Motore de Stirling – Hju Rid

La motoro mem eble ne estas la plej grava inventaĵo sed ĝi estas unu el mult-multaj en la klaso de 'varmo-motoroj', kviuj estas gravaj pro du kialoj: 1e la kontribuo al la scienca fako termodinamiko kaj 2e kontribuo al la kvalito de vivo de la homaro.



Videblas en la foto du cilindroj kun piŝtoj. La malpli granda estas la 'labora' kaj pelas la radon. La pli granda estas la 'varmotransmova', kvies piŝto movas entenatan gason el kontakto kun la varma suba plato en kontakton kun la malvarma supra plato. Poste ĝi inversigas la movon – de la malvarma supra al la varma suba – por denove ripeti la ciklon. Kviam la gaso varmiĝas ĝi ekspansias kaj pelas la laboran piŝton supren. Kviam ĝi malvarmas ĝi malekspansias, tiel 'tirante' la piŝton malsupren.

Robert Stirling naskiĝis apud Methven en Perthshire 1790. Li fariĝis pastro en la Eklezio de Skotlando kaj en la sama jaro 1816 inventis motoron kviu inkluzivis lian novaĵon 'efigikilon'. Lia motivo estis altigi la efikecon de brulaĵo, sed estas onidiro, ne-pruvita, ke ĉagrenis lin la mortoj pro eksplodoj de tiamaj altpremaj vapormotoroj.

La teoria fono de la motoro ne fariĝis klara ĝis la eksperimenta kaj teoria laboroj de Nicolas Leonard Sadi Carnot, publikigita en 1824. Dum la ekspansia parto de ciklo la gasaj premo kaj temperaturo sekvas specifan serion de valoroj, kaj en la malkepsansia fazo alian serion de valoroj. La diferenco inter la du sinsekvoj egalas al la laboro farita de la motoro dum la ciklo. La plej efika ciklo permesata de la leĝoj de la naturo – specife la dua leĝo de termodinamiko – estas la tiel-nomata Carnot-ciklo.

Stirling, celante plej efikan desegnon de motoro, kreis motoron kiu ja sekvas kviel eble plej proksime la ciklon de Carnot.

La sukceso de varmo-motoroj por helpi ne nur homojn sed ankaŭ bestojn videblas en tio ke ni ne plu vidas ĉarojn tirataj de ĉevaloj en niaj stratoj. Por fari domojn oni fosas teron kaj levas konstrumaterialojn per grandaj maŝinoj – tre malofte homoj fosas fundamentojn per ŝpatoj. Eble homoj kaj la medio estis pli fortaj en la pasinteco, sed kompreno de termodinamiko devos helpi al la

evoluigo de novaj maŝinlaboriloj, kviuj pli sanas ol la nunaj dizelaj kaj benzinaĵaj motoroj. Fakte la Stirlinga motoro estas unu el tiuj.

La problemo kviun havas la Stirlinga motoro estas la proporcio de povo kontraŭ pezo – dizelaj kaj benzinaĵaj motoroj de sama povo estas malpli pezaj. Siatempe pli efikaj vaporaj motoroj pli sukcesis ol la motoro de Stirling, kaj ĝi perdis favoron. Sed en la moderna epoko leviĝis intereso pri la motoro pro du ĉefaj kialoj – kvieteco kaj media protekto (ĝi povas utiligi kvian ajn fonton de varmo, precipe ne nur fosiliajn brulaĵojn).

Uzoj modernaj: en svedaj submaraj ŝipoj, en privataj jaĥtoj kaj similaj boatoj, por kombinitaj hejtigilaj sistemoj en domoj, produkto de elektro per koncentrado de sunvarmo per parabola spegulilo, inversa motoro kiel fridigilo por kriogeniko.

La Televido – Norman Richardson

La plej impona inventaĵo de la dudeka jarcento eble estas la televido, kiun mia bopatro inventis. La televido donas al ni konstantan distriĝon. Ĝi informas nin pri la aferoj de la registaro kaj la aktiveco de krimuloj, krom tio pri la sportistoj kaj famuloj. Ni ne plu devas legi la librojn aŭ rigardi la bildojn por amuzi nin. Ni povas studi la historion aŭ lerni pri arto kaj la teatro per la televido. Estas ankaŭ eble aŭskulti kaj rigardi orkestrajn koncertojn tra la tuta mondo. Ni povas vidi multajn strangajn bestojn en diversaj landoj aŭ en la oceano. Oni povas studi la vivostilon de la grandegaj balenoj aŭ eltrovi la kutimojn de tre malgrandaj insektoj: ekzemple de la abeloj kaj la formikoj. Ni povas ridi kiam ni rigardas komediojn kiel ekzemple “Dad’s Army” aŭ ĝui la necertecon kiam ni vidas streĉotenajn filmojn kiel ekzemple “Midsomer Murders”.

Bedaŭrinde ni eble konsumas tro multe da tempo kiam oni montras informojn kaj interesajn programojn kaj oni neglektas la aliajn aferojn kiujn ni devus fari. La infanoj fakte konsumas tro da

tempo pro la televido. Multaj plenaĝuloj ankaŭ rigardas tro multajn programojn kiuj estas senvaloraj. Tamen, malgraŭ la malbonaj trajtoj, la televido estas tre impona kaj efika inventaĵo.

Skribomaŝino – Sheila Henderson

Mi opinias, ke unu el la plej gravaj inventaĵoj estas la skribmaŝino. Ĝi estas rapida metodo por skribi, ekzemple, leterojn, raportojn aŭ dokumentojn.

Mi supozas, ke antaŭ la invento de la skribmaŝino oni devis uzi aliajn rimedojn por fari taskojn kiel verkadojn de revuoj, artikoloj, leteroj, ktp. La unua skribmaŝino kiun mi uzis kiam mi laboris estis permana skribmaŝino. Post kelkaj jaroj mi uzis elektran skribmaŝinon; post tio mi uzis elektronikan. Finfine, mi ne povis kredi, ke mi devus uzi komputilan redaktilon.

Se oni ne inventis la skribmaŝinon, eble komputiloj kaj redaktiloj ne ekzistus!

Mia Biblioteko en la Ĉielo – David Bisset

Antaŭ du jaroj mi aĉetis Fajran Tablojdon. Mi ĉefa celo estis akiri la flekseblecon de portebla aparato aldone al mia komputilo. Kompreneble mi sciis, ke la ilo ankaŭ taŭgis por libroj Kindle-formataj; sed tio estis flankafero.

Nun mi plejparte uzas la komputilon por verkado, butikumado, ludado, televidrigardado kaj mia foto-kolekto. La tablojdo estas uzata por baza serĉado kaj e-mesaĝoj. Sed la revolucio por mi estas la akirado de elektronikaj libroj. Mi ne tute forlasis konvenciajn librojn, ĉar iuj libroj estas belaj, iuj estas nehaveblaj elektronike, iuj ankoraŭ estas malpli kostaj. Mi ankaŭ havas filozofion donaci librojn kiujn mi neniam relegos.

Do kio estas la virtoj de e-libroj? Ili povas resti en ĉiela biblioteko; ili rekte ligiĝas kun vortaroj, Vikipedio, ktp; ili permesas la aldonon

de notoj, sub-linioj, ktp; ili ebligas flekseblecon pri litergrandeco kaj litertipoj. E-libroj ankaŭ ofte estas malmultekostaj aŭ senkostaj kiam kopirajto ne plu validas. Estas plezurige ferii kun 20 libroj kiuj pezas nenion! Kaj eĉ akiri aliajn aliloke se oni havas retaliron.

Jes, la kapablo tuj akiri e-librojn estas tento precipe kiam estas portempa prezredukto; sed la peko estas malgranda, ĉu ne?

Antaŭnelonge mi donacis Kindle Paperwhite al mia edzino. Ĝi estas pli simpla ol la Fajro, sed ĝi estas nekredeble papersimila, kaj ĝi ankaŭ estas uzebla sur la plaĝo kiam la mediteranea suno brilegas!

Kaj la Ĉiela Biblioteko apartenas al ambaŭ el ni!

Frua Skribarto – Donald Robertson

Skribado estas unu el la plej gravaj elpenŝaĵoj en la historio de la mondo. Ĝi estas metodo por reprezenti lingvon en videbla formo. Skribsistemoj uzas aron de simboloj por reprezenti la sonon de parolado.

Skribado originis en Sumero en Mezopotamio kaj poste evoluis en Egipto. Frua skribado komenciĝis ĉirkaŭ 3,100 a.K. per ikonoj aŭ malgrandaj pentraĵoj kiuj reprezentis ideojn. En la temploj de Sumero oni evoluigis metodon por teni kontojn pri varoj liveritaj al la temploj kaj pri bestoj por ofero. Simplaj piktogramoj estis premitaj en malsekajn argilajn tabuletojn kiuj, sekigitaj en la suno, povis esti konservitaj kiel registroj. Fine la evoluinta metodo estis uzata por disvastigi informojn pri la konata mondo. Ĝi povis teni kunaj imperiojn kiuj kovris vastajn distancojn.

La Egipta skribado evoluis iom pli poste. La karakteroj nomataj hieroglifoj, estis multe pli pitoreskaj ol tiuj de Mezopotamio. Hieroglifoj estis unue ĉizitaj sur temploj, tomboj kaj aliaj sanktaj artfaraĵoj. Enkonduko de papiruso plifaciligis la laboron de profesiaj

skribistoj. En tiuj tempoj ekzistis tri versioj de skribado: la heraldika, uzita por religiaj aferoj, la alia por literaturo kaj la tria por privataj leteroj kaj komerco. Ili estis uzataj ĝis proksimume 400 a.K. kaj ne tute deĉifritaj ĝis la 19a jarcento kiam la Rosetta Ŝtono estis malkovrita. La Rosetta Ŝtono estis trovita en la urbo Rosetta apud la Mediteranea marbordo de Egipto far franca soldato laboranta je riparo de la fortikaĵo. Ĉar la tri malsimilaj gravuraĵoj skribitaj sur la ŝtono en tri lingvoj havis la saman signifon, oni sukcese deĉifris la hieroglifojn.

En Ĉinio en ĉirkaŭ 1600 a.K. evoluis la skribsistemo kiu, malsimile al la aliaj, restas en uzo ĝis nuntempo. Malgraŭ la fakto ke ĝi estas maltaŭga por presado, skribmaŝinoj aŭ teksto prilaborado, postulas studon de granda nombro da skribsignoj, ĝi postvivis kaj ankaŭ influis la japanan lingvon.

La fenica lingvo estas el Ŝemida lingvofamilio kiu ampleksas la lingvojn aramean (kiu forte influis skribsistemon en Hindio), sirian, fenican, hebrea kaj araban. Fenicoj elpensis alfabetan skribon sed nur konsonantoj estis skribitaj, lasante vokalojn al interpreto de la leganto.

La alfabeto derivas sian nomon de la unuaj du literoj en la fenica sistemo, nome alfa kaj beta. La kontribuo de Grekoj, kiuj adaptis fenican sistemon en la 8a jarcento a.K., estis aldono de vokaloj kio rezultigis en la greka alfabeto de 24 literoj.

La Romianoj antaŭenigis la grekan alfabeton por formi literojn taŭgaj por la latina skribado. Dank' al Romianoj la skribado disvastiĝis tra Romia imperio kaj fine tra granda parto de la mondo kiel norma sistemo de skribado. Tiam ekzistis multaj centroj de lernado, ĉefe por la riĉuloj kaj por tiuj ligitaj al la religio, registaraj aferoj kaj komerco.

Post la disfalo de la Romia imperio en Eŭropo ekzistis kaoso dum

kiu militistoj batalis por akiri posedaĵojn. Britio estis invadita de Vikingoj kaj Anglosaksoj kaj Vilhelmo de Normandio. Enkonduko de la feŭda sistemo far Vilhelmo de Normandio malplibonigis la vivkondiĉojn de la ordinaraj homoj kiuj koncerniĝis pri produktado de sufiĉa nutraĵo por manĝi kaj de tegmentoj super siaj kapoj. La lokoj de lernado fermiĝis kaj skribado estis ligita al preĝejoj. Multaj potencaj homoj estis analfabetaj. Tamen en multaj monaĥejoj monaĥoj kopiis verkojn de granda beleco.

Je la fino de la 15a jarcento, Gutenberg inventis la presilon. Ĝi ebligis normigon de la komuna lingvo kaj ebligis al popolo akiri scion sen interpretada helpo de pastraro. Eĉ ordinaraj homoj komencis legi, precipe la biblion, kaj la legado disvastiĝis.

La Ĝardencentro – Jean J Bisset

Antaŭnelonge mi rigardis televidprogramon pri ĝardenumado. La bone konata ĝardenisto Monty Don rimarkis, ke pasintecce la Ĝardencentro ne ekzistis. Laŭ mia opinio ili nur ekaperis antaŭ 40 aŭ 50 jaroj. Antaŭ tiam oni nur ricevis etajn tranĉitajn pecojn de plantoj dankinde al amikoj. Ofte printempe persono kiu posedis grandan ĝardenon kaj estis sperta ĝardenisto metis signon sur sia ĝardenpordego montrantan, ke malmultekostaj plantoj vendiĝas. Ankaŭ homoj kreskigis plantojn uzante semojn aŭ detranĉetaĵojn. Certe plantidejoj ekzistis kaj oni povis poŝte akiri semojn. Mi kiel infano memoris la alvenon de brunaj paketaĵoj - ne tiel buntaj kiel nuntempaj! Ŝajnis magie al mi kiam ili ekkreskis kaj floroj aŭ laktukoj aperis! Dum la militjaroj homoj tre volis kreskigi legomojn pro la manko de manĝaĵoj, kaj la registaro forte kuraĝigis tion. Mi memoris la provojn malebligi la atakojn de birdoj kaj kunikloj.

Mi ne scias precize kiam la unua Ĝardencentro ekaperis en Britio, sed la ideo estis tre sukcesa. Nun la centroj vendas multe pli ol plantoj - mebloj, tapiŝoj, ornamaĵoj, ktp. Lau mi tro: mi multe preferis

la pli simplajn Ĝardencentrojn; sed mi ankoraŭ pensis, ke la originala ideo estis bona!


Amikumu alproskimiĝas

Fine de 2016 aperis kampanjo amasfinancada por nova komputila aplikaĵo (neoligisme *apo*), kiu pretendas helpi Esperantistojn trovi aliajn. Jen granda deklaro kiu, se vere, solvas la kutiman problemon kuŝantan malantaŭ la rapida malinteresiĝo de novuloj: "Mi komencis lerni Esperanton, sed ne povas trovi iun alian, kun kiu paroli." Malbone por la forlasinto, malbone por la reputacio de Esperanto.

Tial miaj kolegoj en la kuratoraro de la Esperanto-Asocio de Britio rapide faris decidon uzi iom da mono de la karitato por finance subteni *Amikumu*. Ne temis pri granda sumo, sed sufiĉe por doni al EAB la rolon de sponsoro. Jam riceviĝis personaj kontribuoj de dudeko da aliaj homoj, sed mi aparte ĝojas, ke estis la donaco de EAB, kiu sukcesis puŝi la kampanjon preter ĝian celon post nur 27 horoj. Finfine la kampanjo havigis al la skipo pli ol trifoje la minimumo petita, kiu ebligis al la programistoj enmeti pli. Ekzemple, nun eblas ne nur trovi aliajn parolantojn, sed ankaŭ publikigi aranĝojn. Kio montras bele la populareco de *Amikumu* estas, ke ĝi sukcesis je 300% kaj ricevis monon de 429 homoj kaj grupoj -- la simila posta kampanjo de la *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo* okazigi *Internacian Junularan Kongreson* en Afriko en tri monatoj rikoltigis nur 10% de la sumo petita kaj de nur 20 homoj kaj grupoj, inter alie EAB.

Dum iom da tempo la subtenantoj de *Amikumu* rajtas uzi provversion por testado. De propra sperto mi scias, ke ĝi funkcias -- unu

el miaj studentoj ŝaltis ĝin survoje al taverno post kurso, kiun mi gvidis kaj kontrolis ĉe *Amikumu*. Ŝi ricevis la konfirmon, ke pluraj homoj troviĝas for je kvar kilometroj. (Mi substreku, ke tiuj homoj permesis al Amikumu montri ilin. Facile eblas ŝanĝi agordon tiel, ke oni ne videblas.) Kaj ni montris al dubetemulo en nia grupo kiom facile tio estas; ŝalti la apon, trovi Esperantistojn, alklaku por sendi al tiuj mesaĝojn, kiun tiuj tuj ricevos ene de Amikumu. Tiel oni ne nur trovas homojn en la ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ povas kun ili aranĝi renkontiĝi.



Laŭplane la versio por Esperantistoj publike disponeblos en aprilo, kun baza senpaga membreco, kaj pli da servoj kontraŭ modesta sumo. Iom post iom la skipo aldonos pli da lingvoj, ĝis disponebligo de ĉiuj ĉirkaŭ 7 mil lingvoj parolataj kaj signaj en julio.

Eĉ se vi ne uzos Amikumu mem (kaj evidente la plejparto inter vi jam trovis Esperantistojn kun kiuj uzi la lingvon), mi esperas, ke vi ĉiuokaze scios diri al eventualaj novaj interesuloj "ekzistas apo kiu ebligas al vi trovi aliajn homojn". Kaj se tio iom komplikas, vi havas mian plenan permeson afable puŝi la novulon miadirekten kaj mi ĉion klarigos.

Tim Owen

Nekrologo

Muriel Shackleton (1928-2016)

La 26an de novembro mortis Muriel Shackleton en flegejo en Bradford. Ŝi estis longdaŭra membro de la Skota Esperanto Asocio, aktiva membro en la Jorkŝira Federacio kaj dum jardekoj gvidis la bradfordan lokan grupon. Ŝi ekinteresiĝis pri Esperanto en 1950aj jaroj. Muriel kun la amikino Audrey Duerden regule partoprenadis Skotajn Kongresojn. Muriel aktive partoprenis en la programoj kaj kontribuis al nia gazeto "Esperanto en Skotlando". Estis plezuro koni tiun ĉarman, afablan kaj modestan esperantistinon kies ĉeesto ĉiam vigligis kunvenojn.

Niaj kondolencoj al la familio kaj amikoj.

Kalendaro

Enbritaj Eventoj

majo 2017

19 - 21. majo

[Brita kaj Skota Kunkongreso de Esperanto](#). La 98a Brita kaj 112a Skota kongresoj de Esperanto okazos en 'The Melting Pot', Rose Street, Edinburgo.

Internaciaj Eventoj

majo – septembro 2016

16 - 23. majo

[Kongreso de IFEF, Internacia Fervojistaj Esperanto-Federacio](#) - en Colmar, Francio. Jara kongreso de IFEF kun fakaj kunsidoj kaj ekskursoj en orient-Francia regiono Alzaco. Inf.: André Grossmann, 5 rue des Pyrénées, FR-68390 BALDERSHEIM, Francio.
Rete: laurent.vignaud@free.fr

29. oktobro - 1. novembro

[Esperanto-Karavano 2017](#) - Esperanto-Karavano survoje al la 102-a UEA-Kongreso en Seulo sub aŭspicio de Rusia E-Unio kaj Korea E-Kulturcentro.
Inf: esperantokaravano@gmail.com

4 - 13. julio

[La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto](#) - en Universitato William Peace, Raleigh, Norda Karolino, Usono. Ok tagoj da lernado, amuzo, kaj esplorado de la mirindaj muzeoj, restoracioj, butikoj, kaj sidejoj de la registaro, ĉiuj piede atingeblaj de la universitata kampuso. Inf.: La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia, WA 98512, USA

22 - 29. julio

[Universala Kongreso de Esperanto, UK-2017](#) - en Seulo, Suda-Koreio. Inf.: x, rete: -
Retejo ĉe UEA: <http://www.uea.org/kongresoj/>

6 - 12. aŭgusto

[1-a INTER-FEST](#) - en Bjelovar, Kroatio. Novtipa Esperanta kultura festivalo kun vasta gamo de programoj. Temo: Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo. Organizas: Bjelovara Esperantista Societo kaj tri aliaj kroataj Esperanto-societoj. Inf.: Bjelovara Esperantista Societo, Vlatka Maĉeka 14, HR-43000 Bjelovar, Kroatio.

Rete: esperanto.bjelovar@gmail.com

29. septembro - 3. oktobro

[17-a KoKoLoRES - Kafoklaĉo kaj Ludoj dum RENkontiĝo Semajnfina](#) - en Schwerte, Ruhr-regiono, Germanio. LA aranĝo por ludemuloj, sed ne nur, laŭbezono okazos kurso por komencantoj. Inf.: Petra Dückerhoff, rete: petra.dueckershoff@esperanto.de

